

Juĝoj de s-roj Claude Piron, Arthur Baur, Giorgio Silfer pri la Esperanto-ekspozicio en la Nacia Biblioteko

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-808/262, 1979 aprilo 05 kaj 07

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-38/SRI-1979-38-A-1-262-808-1979-04-05-07-Claude-Gacond-Jughoj-de-s-roj-Claude-Piron-Arthur-Baur-Giorgio-Silfer-pri-la-esperanto-ekspozicio-en-la-Nacia-Biblioteko.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Ekde la komenco de januaro, ĝis pasko granda ekspozicio pri la temo 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando' estas videbla en la enira koridoro de la Svisa Nacia Biblioteko en Berno. En la kadro de la inaŭguro de tiu ĉi ekspozicio okazis ĉe Svisa Radio Internacia forumo, el kiu ni hodiaŭ aŭdigas erojn. Vi aŭdos demandon de s-ino Marie-Louise Münger (MLM) kaj poste respondojn de Giorgio Silfer (GS), Claude Piron (CP), Arthur Baur (AB) kaj fine denove Giorgio Silfer.

MLM.- Mi dezirus scii, ĉu ĝis nun vi jam vidis ekspozicion similan al tiu ĉi, tio signifas, kiu estas tiel bone preparita kun ĉiaj dokumentoj. Ĝenerale, kiam mi vidis ekspoziciojn, estis pli malgrandaj kaj ne tiel zorgeme preparitaj. Kaj ni estas en Svislando kaj pritraktas Svislandon, sed eksterlande kiel vi vidis kaj spertis ?

GS.- Mi respondas per unu frazo, nome ke la ekspozicio ĉi tie estas inda je la Nacia Biblioteko de teknologie tre evoluinta lando. Do ĝi estas la maksimumo eble en la mondo, laŭ tiu vidpunkto.

CP.- Mi tre ĝojas, ke Marie-Louise Münger starigis tiun demandon ĉar mi povas tiel tutkore diri: ne, neniam ie ajn mi vidis pri esperanto aŭ pri interlingvistiko similan ekspozicion, ke tio, kiel mi diru, igas min retaksi, rejuĝi la ekspozicion kaj retaksi ĝin multe pli altnivela ol estis mia eble unua impresio. Ĉar efektive, ĝi estas profesnivela, ĉu ne, oni sentas ke la grafikisto estas fakulo, specialisto. Ke la homoj kiuj konceptis la ekspozicion ankaŭ estas kompetentaj kaj ne nur kompetentaj, sed dediĉis multege da laboro al tiu ekspozicio. Kaj efektive, kiam oni pensas kiom da laboro faris ekzemple Claude Gacond estas neimageble, mi pensas, ke la publiko ne imagas, kiom da laboro troviĝas malantaŭ tiuj paneloj. Kaj do mi devas diri, efektive mi vidis kelkajn ekspoziciojn pri esperanto en mia vaganta vivo kaj ĉiam min frapis la fakto ke ili estas improvizitaj aŭ kvazaŭ improvizitaj. Kun paneloj felt-krajone rapide faritaj. Kun amasoj da gazetaj dokumentoj ŝutitaj unu super la aliaj, kaj tiel plu. Kaj ĉi tie oni vidas, ke estas ordo, ke estas pripensado, koncepto kaj ke estas profesia laboro malantaŭ ĝi. Sed, kiu ajn la manko, tiu ĉi estas tre tre alte pli trafa, scienca, objektiva kaj bela ol iu ajn ekspozicio pri esperanto kiun mi iam ajn vidis.

AB.- Dum la tuta diskutado mi venis al certa konkludo, ĉar mi eltrovis ke efektive ekzistas du tute diversaj specoj de ekspozicioj. Kaj ĉi tiu ekspozicio, kiu okazas en la Nacia Biblioteko, kiun frekventas homoj, kiuj studas, estas studentoj, profesoroj, akademiuloj, homoj kiuj interesiĝas pri kulturaj aferoj. Por tiu loko la ekspozicio estas ideala, kaj ĝi estas tute senpropaganda kaj estas sur vere akademia nivelo. Kaj kion kelkaj diris, tio ankaŭ estas vera kaj ĝusta, sed tio estas tute alia speco de ekspozicio – kaj mi opinias, ke oni devus nomi ĝin 'stando'. Tio estas la speco de ekspozicio, kiun oni havas en naciaj foiroj, kie oni volas vendi varojn. Tie devas esti multaj prospektoj, afiŝoj estas tre gravaj, belaj gazetoj eksterlandaj, ne gravas, kaj flugfolioj ankaŭ estas gravaj. Kaj plej bone estas se ankoraŭ bela fraŭlino staras en la stando kaj respondas la demandojn. Tio estas 'stando', propagandcela stando, kaj la ekspozicio pri kiu ni hodiaŭ parolas kaj kiun ni ĉiuj admiris, estas io alia sur alia nivelo.

GS.- Jes, mi volus diri tion, ke tri estas la elementoj de ĉi tiu ekspozicio: esperanto, interlingvistiko kaj Svislando. En tiu ĉi kazo oni povas havi ankaŭ alian ŝlosilon por viziti ĝin. Kaj laŭ mi tiu estas efektive la ŝlosilo, kiun oni uzis. Nome, unuavice temas pri kio okazas en Svislando, duavice pri interlingvistiko kaj kadre de tio pri esperanto. Se oni volas fari ekspozicion pri interlingvistiko, kie oni prezentas ĉiujn planlingvojn sur scienca nivelo, oni povas elekti ur du landojn de Eŭropo, nome, aŭ Svislandon aŭ Svedion. Ili estas la du solaj landoj, kiuj restis ekster la ŝtormo de la dua kaj de la unua mondmilito, de ambaŭ mondmilitoj. Kaj kie do pretervivis eĉ la duan mondmiliton homoj el la diversaj skoloj, el la diversaj tendencoj. Volapükistoj, eĉ okcidentalistoj, kompreneble ankaŭ idistoj. La kontribuo kiun donis Svislando al tiu ĉi nova branĉo de lingvistiko, al planlingvistiko, tio estas laŭ mi la ĝusta, la trafa ŝlosilo por viziti la ekspozicion. Kaj kompreneble, kadre de tiu ĉi branĉo, la ĉefa rolo apartenas al esperanto. Tion oni vidas, sed mi volus vere ke oni substreku la fakton, ke unuavice temas pri Svislando, kaj duavice pri iu fako de lingvistiko. Tra tio oni alvenas al esperanto, kiu okupas kompreneble tre gravan pozicion, la plej gravan pozicion kaj finfine la solan gravan pozicion. Sed, se ni startas de la fino, ni povas efektive miskompreni la aferon kaj tiam ni faras en tiun eraran inklinon al propagandeco, kiun ni devas eviti, se nia ŝlosilo estas efektive tiu, kion mi ĵus priskribis. Per tio mi volas konkludi dirante ke estante la homo kiu malplej kontribuis al la afero, ĉar mi nur donis la ideon por unu panelo kaj tradukis kelkajn komentariojn en la italan lingvon, do estante la plej ekstera homo fakte ĉe la plej maldekstra flanko, angulo de ĉi tiu tablo, indas efektive gratuli unuavice la grafikiston kaj duavice Claude Gacond pri la laboro kiun ili plenumis, kiun ili plenumis en malfacilaj kondiĉoj, ne tiom pro subjektivaj kaŭzoj, sed pro la fakto ke samtempe pluraj gravaj eventoj realiĝis en Svislando rilate al esperanto. Do, ekzemple la aĉeto de la du domoj, la inaŭguro, la preparado de la IFA-sesio kaj tiel plu, al kiu IFA-sesio de 1979a mi invitas vin ĉiujn. Inaŭguro okazos la duan de junio en La Chaux-de-Fonds kun granda festparolado de lia rektora moŝto, s-ro Claude Piron, Universitato de Ĝenevo.

Cl.- Vi aŭdis juĝojn de Arthur Baur, Claude Piron kaj Giorgio Silfer pri la valoro de la ekspozicio 'Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando', responde al demando farita de Marie-Louise Münger. Salutas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Ĝis reaŭdo!